

2024.11.23 Francio, de urso

Kara Jasuo, jen miaj komentoj pri via lasta sendajxo. Plej amike URSO

Dankon al S-ro *Tomasz KAMUSELLA* por tiuj historiaj klarigoj ege interesaj, al S-ro *Bardhyl SELIMI* por la traduko al esperanto kaj al S-ro *HORI Jasuo* por la traduko al la japana lingvo.

Usono estis imperio tera antaŭ fariĝi mara, sed ĝi malsimilis al Rusio, Ĉinio kaj Irano, ĉar ĝi kvazaŭ tute pereigis ĉiujn originajn popolojn de sia nordamerika teritorio ! Kial tiuj angla-saksaj blankuloj "impetis okcidenten" kun Biblio en unu mano kaj pafilo en la alia ? Ĉu ankaŭ la "patroj pilgrimantoj" kredis esti "popolo senlanda" die rajtigita okupi "senpopolan landon" ?

Ankaŭ germanoj provis krei teran imperion en Eŭropo kaj "impetis orienten" por konkeri landojn pereigante aŭ sklavigante ties popolojn "nariajn".

Brita imperio mara konstante malebligis estiĝon de eŭropa imperio tera, ĉu franca de Napoleono la unua, ĉu germana de Vilhelmo la dua kaj de Hitlero, ĉu rusa dum la "granda ludo" de Klipling kaj dum la "malvarma milito". Tamen Britio kaj Rusio sukcesis trovi en 1907 pacan interkonsenton pri iliaj respektivaj influferoj en centra Azio, sed montriĝas ke la nunaj regantoj de Usono ne kapablas fari la samon kun Rusio en Eŭropo...

Libereco povas fariĝi kaŭzo de ĥaoso kaj malordo, kies fajro estas neestingebla. Ekzemplo de absoluta libereco estas bestoj sed konvenas al homo observi leĝon, kiu protektas lin kontraŭ lia propra neklereco kaj kontraŭ maliculoj. Senbrida libereco igas homon forgesi la postulon de afableco kontraŭ sia homfrato, lin maldignigas kaj malaltigas ĝis plena malvirteco. Kaj demokratio jam delonge fariĝis iluzio... en 2005 la franca popolo voĉdonis je 54,68% kontraŭ traktato por estigis Eŭropan Konstitucion sed tamen francaj deputitoj trudis al ĝi en 2007 la tute similan traktaton de Lisbono por "reformi la Eŭropan Union" !

2024. 11. 23 フランス、eric bernard coffinet [eric.coffinet@wanadoo.fr](mailto:eric.coffinet@wanadoo.fr)

Jasuo 様、あなたの最新の投稿に対する私のコメントです。非常に興味深い歴史的説明をしてくださった Tomasz KAMUSELLA 氏、エスペラント語への翻訳をしてくださった Bardhyl SELIMI 氏、そして日本語への翻訳をしてくださった HORI Jasuo 氏に感謝いたします。

米国は海洋帝国になる前は地上帝国でしたが、ロシア、中国、イランとは異なり、北米領土の原住民をほぼ完全に滅ぼしたのです。アングロサクソン系の白人たちはなぜ片手に聖書、もう一方の手に銃を持って「西へ突進」したのでしょうか？「巡礼者の父」たちも、自分たちが「民族のない土地」を占領することを神から与えられた「国のない民族」であると信じていたのだろうか？

ドイツ人はまた、ヨーロッパに陸上帝国を築こうとし、「非アーリア人」の人々を破壊するか奴隷にすることで諸国を征服するために「東へ急ぐ」ことを試みた。初代ナポレオンによるフランス人であれ、ウィリアム2世とヒトラーによるドイツ人であれ、クリプニングの「グレートゲーム」中や「冷戦」中のロシア人であれ、イギリス海洋帝国は常にヨーロッパ陸上帝国の出現を阻止した。しかし、イギリスとロシアは 1907 年に中央アジアにおけるそれぞれの勢力範囲に関してなんとか平和的な合意を見つけることができましたが、アメリカの現在の支配者はヨーロッパにおけるロシアに対して同じことをすることができないことが判明しました...

自由は混乱と無秩序の原因となる可能性があり、その火は消すことができません。動物は絶対的な自由の一例ですが、人間は自分自身の無知や悪者から身を守る法律を守る義務があります。無制限の自由は、人を同胞に対する優しさの要求を忘れさせ、人を貶め、完全な墮落の境地まで墮落させます。そして民主主義はとっくの昔に幻想となっている...2005 年にフランス国民は欧州憲法制定条約に 54.68%で反対票を投じたが、それにもかかわらずフランスの議員らは 2007 年に「欧州連合改革」を目的として全く同様のリスボン条約を押し付けた。！

2024.11.23 Nepalo,

**Okazis Esperanto-Kurso ĉe Kotesar Multifaka Kolegio, Jadibuti, Katmanduo**



La Departemento pri Kampara Disvolviĝo (Fakultato de Kampara Disvolviĝo, Sociologio kaj Amaskomunikado) organizis 20-horan ne-kredithoran kurson pri Esperanto. Ĉi tiu projekto estas oficiale subtenata de Kotesar Multifaka Kolegio.

Hodiaŭ matene okazis la solena inaŭguro de la kurso. S-ro Manoj Adhikari, la ĉefo de la departemento, bonvenigis la ĉeestantojn. Kiel la ĉefa gasto de la evento, S-ro Govinda

Bahadur Karki, la ĉefo de la kolegio, parolis pri la graveco de Esperanto kiel neŭtrala internacia lingvo kaj pri ĝia historio. Prof. D-ro Bharat Kumar Upadhaya, sekretario de Nepala Esperanto-Asocio, prezentis inspirplenan prelegon pri Zamenhof, kuraĝigante la studentojn pli profunde esplori la lingvon.

La instruisto de Esperanto, Bharat Kumar Ghimire (asista profesoro de la sama kolegio), klarigis la bazojn de la lingvo kaj respondis diversajn demandojn de la partoprenantoj. La programo estis gvidata de S-ro Padam Raj Joshi, ankaŭ asista profesoro de la kolegio. Post la inaŭguro, okazis la unua leciono de la kurso, kiu estos regule organizata ĉiusabate ĝis sia konkludo.

Ĉe la fino de la kurso, la studentoj ricevos oficialan atestilon de la kolegio. Ni esperas, ke ĉi tiu kurso helpos pligrandigi la nombron de Esperanto-parolantoj en nia komunumo. Notinde, el la 50 partoprenantoj, preskaŭ ĉiuj estas malpli ol 25-jaraj, kio reflektas la kreskantan intereson de la junularo pri la lingvo.

Unuafoje en la historio de la Esperanto-movado en Nepalo, oficiala Esperanto-kurso estas organizita en kolegio. La kurso estas senpaga, kaj la instrumaterialoj estas subvenciitaj de la kolegio mem. Ni elkore dankas la ĉefan administranton, S-ron Nhuchhe Lal Maharjan, pro la pretigo de la instrumaterialoj. Ni ankaŭ esprimas sinceran dankon al la asistantaj geprofesoroj Lekha Nath Ghimire, Govinda Katwal, Sabitri Dhakal (ĉefo de la Angla Departemento) kaj Rudra Bhattarai pro ilia valora subteno kaj aktiva partopreno en ĉi tiu grava projekto.

Koran dankon al la tuta familio de Kotesar Multifaka Kolegio pro ilia sindediĉo kaj engaĝiĝo al la disvastigo de Esperanto.

**Prezidanto,**

**Bharat Kumar Ghimire**

**Nepala Esperanto-Asocio**

2024. 11. 23 ネパール、

カトマンズのジャディブチにあるコテサル総合大学でエスペラント語コースがありました 農村開発学部（農村開発、社会学、マスコミュニケーション学部）は、単位時間外のエスペラント語に関する 20 時間のコースを企画しました。このプロジェクトは、Kotesar Multidisciplinary College によって正式にサポートされています。今朝、厳粛にコースの開会式が行われました。同部門の責任者であるマノージ・アディカリ氏が出席者を歓迎した。イベントのメインゲストとして、大学長のゴビンダ・バハドゥル・カルキ氏が中立的な国際言語としてのエスペラントの重要性とその歴史について語った。教授ネパール・エスペラント協会の事務局長であるバーラト・クマール・ウパダヤ博士は、ザメンホフについて刺激的な講義を行い、学生たちにこの言語をより深く探求するよう奨励しました。エスペラント語教師のバーラト・クマール・ギミレ氏（同大学助教授）が言語の基礎を説明するとともに、参加者からのさまざまな質問に答えた。このプログラムは、同じく大学の助教授であるパダム・ラジ・ジョシ氏によって実施されました。開始後、コースの最初のレッスンが行われ、終了まで毎週土曜日に定期的に開催されます。

コースの終了時に、学生は大学から公式証明書を受け取ります。このコースがコミュニティ内でエスペラント語を話す人が増えることを願っています。参加者 50 名のうち、ほぼ全員が 25 歳以下であり、この言語に対する若者の関心の高まりを反映していることに留意すべきである。ネパールのエスペラント運動史上初めて、大学で正式なエスペラントコースが組織されました。コースは無料で、教材費は大学から補助金が出ます。教材を準備していただいた最高管理者のヌチェ・ラル・マハルジャン氏に心より感謝いたします。また、この重要なプロジェクトに貴重なご支援と積極的なご参加をいただきました助教授の Lekha Nath Ghimire 氏、Govinda Katwal 氏、Sabitri Dhakal (英語学科長) 氏、および Rudra Bhattarai 氏に心からの感謝の意を表します。エスペラント語の普及に対する献身的な取り組みとコテサル複合専門大学の家族全員に多大な感謝を申し上げます。社長、バーラト・クマール・ギミール ネパール・エスペラント協会

2024.11.24 DR Kongo  
NOVAĴOJ

Norda Kivu: Ekonda insekto, nova minaco por forlokitaj homoj ĉirkaŭ Goma ĉefurbo de Norda Kivu -Provinco/DR Kongolando.

Klimata ŝanĝo foje estas akompanata de apero de laŭsezonaj insektoj. Ĉi tiuj povas esti damaĝaj al sano. Tio estas precipe la kazo de fama insekto kiun multaj homoj de Kinŝaso nomas Ekonda. De ĝia scienca nomo "Paederus", ĉi tiu insekto liberigas kemian substancon nomitan "Pederine" kiam estas dispremita sur nuda haŭto. Ĉi tio povas konduki al lezoj aŭ brulvundoj, se la haŭto ne estas tuj lavita per akvo kaj sapo.

Fakte, en la tendaroj de delokitoj ĉe la periferio de Goma, malfortikeco kaj malfacilaj vivkondiĉoj cedas lokon al maltrankviliga sankrizo. Krom la ĉiutagaj problemoj, kiujn ili alfrontas, la forlokitoj nun alfrontas novan malamikon: la Ekonda insekto. Ĉi tiu virulenta insekto ĵus invadis plurajn lokojn de forlokitaj homoj, kaŭzante dolorajn haŭtajn lezojn kaj pligravigante la suferon de miloj da homoj jam forte trafitaj.

La situacio estas kritika, precipe en la tendaroj de Rego, Luŝagala, Nzulo, Bulengo kaj Mugunga. En Rego, Byamungu Senzoga, forlokita persono, esprimas sian zorgon: „La invado de ĉi tiu insekto plimalbonigas nian jam malfacilan ĉiutagan vivon. Ni bezonas tujan intervenon de la aŭtoritatoj por ŝpruci insekticidojn kaj limigi ĝian disvastiĝon. » Lia alvoko, elsendita per [\\*estinfo.org\\*](http://*estinfo.org), spegulas la kolektivajn angorojn de loĝantoj, kiuj pro manko de rimedoj trovas sin senhelpaj antaŭ ĉi tiu nevidebla minaco.

Vivkondiĉoj en tiuj tendaroj jam estis ege malfortikaj antaŭ la apero de la Ekonda insekto. En Mugunga, ekzemple, delokitaj homoj alfrontas konstantajn problemojn aliri trinkakvon kaj sanservon. Tiu ĉi situacio plue malfortigas la loĝantojn de la tendaroj, eksponante ilin ne nur al la insekto Econda, sed ankaŭ al aliaj infektoj ligitaj al malbonaj



higienaj kondiĉoj. La manko de akvo, kombinita kun malsanigaj kondiĉoj, malfaciligas teni ŝirmejojn puraj kaj pliigas la riskon disvastigi malsanon.

Ĉi tiu sankrizo, estas grave ke tuj ago estu prenita. Sen rapida interveno, la invado de la Econda insekto povus kaŭzi sankatastrofon en ĉi tiuj jam delikataj lokoj. Humanitaraj organizoj kaj lokaj aŭtoritatoj estas instigitaj preni konkretajn rimedojn, inkluzive de aplikado de insekticidaj traktadoj kaj plibonigo de sanitaraj kondiĉoj en la tendaroj.

Alvoko ankaŭ estas lanĉita por plifortigo de medicina asistado, por ke la tuŝitaj povu ricevi taŭgan prizorgon kaj ke oni realigu konsciajn kampanjojn pri bonaj higienaj praktikoj.

Fonto: [estinfo.org](http://estinfo.org)

Plej amike, Honore SEBUHORO ([honsebn@gmail.com](mailto:honsebn@gmail.com)) el Norda Kivu/DR Kongolando.

2024. 11. 24 コンゴ民主共和国

北キブ州: エコンダ昆虫、北キブ州/コンゴ民主共和国の首都ゴマ周辺の避難民に対する新たな脅威。

気候変動には、季節性の昆虫の出現が伴うことがあります。これらは健康に害を及ぼす可能性があります。これは、キンシャサの多くの人々がエコンダと呼ぶ有名な昆虫の場合に特に当てはまります。

「Paederus」という学名から、この昆虫は素肌に押しつぶされると「Pederine」と呼ばれる化学物質を放出します。皮膚を直ちに石鹸と水で洗わないと、怪我や火傷を引き起こす可能性があります。実際、ゴマ郊外の国内避難民キャンプでは、脆弱さと困難な生活環境により、憂慮すべき健康危機が生じています。日々直面する問題に加えて、避難民たちは新たな敵、エコンダ昆虫に直面しています。この毒性の昆虫は最近、避難民の数か所に侵入し、痛みを伴う皮膚病変を引き起こし、すでに深刻な影響を受けている何千人もの人々の苦しみをさらに悪化させています。特にレ



ゴ、ルシャガラ、ンズロ、ブレンゴ、ムグンガのキャンプでは状況は危機的となっている。

『レゴ』の中で、避難民のビヤムグ・センゾガさんは次のように懸念を表明している。「この昆虫の侵入により、ただでさえ困難な日常生活がさらに悪化する。殺虫剤を散布し、その拡散を制限するために当局の即時介入が必要です。」 \*estinfo.org\* を通じて放送された彼の呼びかけは、資源の不足により、この目に見えない脅威に直面して自分たちが無力であると感じている住民の集団的な不安を反映しています。これらのキャンプの生活条件は、エコンダ昆虫が出現する前からすでに非常に不安定でした。たとえばムグンガでは、避難民は飲料水や医療へのアクセスに常に問題を抱えている。この状況はキャンプの住民をさらに衰弱させ、エコンダ昆虫だけでなく、劣悪な衛生状態に関連する他の感染症にもさらします。水不足と不衛生な環境により、避難所を清潔に保つことが困難になり、病気が蔓延するリスクが高まります。

この健康危機では、直ちに行動を起こすことが重要です。迅速な介入がなければ、エコンダ昆虫の侵入は、すでに脆弱な地域に健康被害を引き起こす可能性があります。人道団体や地方自治体は、殺虫剤処理の適用やキャンプ内の衛生状態の改善などの具体的な措置を講じることが奨励される。また、影響を受けた人々が適切なケアを受けられるよう、医療支援の強化や、適切な衛生習慣に関する啓発キャンペーンの実施も呼びかけられている。

出典: estinfo.org

北キブ/コンゴ民主共和国出身の SEBUHORO (honsebn@gmail.com) より。

2014.11.25 Francio

Kara Jasuo, jen artikoleto mia pri elektromagnetaj efikoj de atombombo. Plej Amike.  
URSO

## **EFIKOJ DE ELEKTROMAGNETA IMPULSO ATOMBOMBA**

verkita la 25an de novembro 2024 de *Éric Bernard COFFINET* (ebcoffinet.fr)

Iu sub la nomo *Avic* verkis en la retejo *reseauinternational.net* (internacia reto, en pluraj lingvoj) je la 22a de septembro 2024 tre interesan artikolon pri la efikoj de elektromagneta impulso generita per eksplodo de atombombo ekster nia atmosfero.

<https://reseauinternational.net/une-attaque-emp-sur-les-reseaux-electriques-et-les-infrastructures-nationales-critiques-des-etats-unis/>

Jen eventuala scenaro apokalipsa pour Usono, kiu ĝis nun ne protektis sian elektroductan reton kontraŭ tia atako :

Dum ŝtormo en vintre malvarma nokto, kvar atombomboj sinsekve eksplodas ekster la

tera atmosfero super la usonaj urbegoj Dallaso, LasVegaso, Kolombuso kaj la golfo de Jukatano. Homoj vidas grandan lumon en la ĉielo sed sentas nek bruon nek blovon nek brulon de tiuj eksplodoj. Sed ili estigas potencegajn ondojn elektromagnetajn, kiuj tuj detruas ĉiujn funkciajn sistemojn elektronikajn kaj elektrajn.

Tio signifas ke ne plu estos por longa tempo ĉio necesa al nia moderna vivo. Ne plus funkcios elektronikaj aparatoj por komunikado kaj regulado. Ne plu funkcios elektraj aparatoj por prilumi, movigi, varmigi, malvarmigi, kuraci kaj pompi aŭ cirkuligi likvaĵojn, pro fizika detruo de la elektrodukta reto. Sekve energiaj produktoj kaj uzinoj ĉesos funkcii, ankaŭ mankos benzino por transporti homojn kaj varojn. Ĉio haltos kaj okazos tuja ĥaoso kun baldaŭaj amasribeloj !

Por tion okazigi, necesas nur unu submara militŝipo, kiu desub la maro en la Meksika golfo ekflugigas balistikajn misilojn. La kelkminute mallonga tempodaŭro de ilia alflugo tute malebligas al usonaj defendoj kontraŭmisilaj ilian detruon antaŭ ilia eksplodo.

La harmonia ekvilibro kaj bona funkciado de nia ege kompleksa civilizo nepre postulas pacon, konkordon kaj kunlaboradon. Nur frenezuloj pretas militi per atomarmiloj !

2014. 11. 25 フランス Éric Bernard COFFINET (ebcoffinet.fr)

親愛なる泰雄さん、ここに核爆弾の電磁的影響に関する私の小さな記事があります。

Avic という名前の誰かが、2024 年 9 月 22 日に Web サイト [reseauinternational.net](https://reseauinternational.net) (国際ネットワーク、複数の言語) に、大気圏外での核爆弾の爆発によって生成された電磁インパルスの影響についての非常に興味深い記事を書きました。 <https://reseauinternational.net/une-attaque-emp-sur-les-reseaux-electriques-et-les-infrastructures-nationales-critiques-des-etats-unis/>

このような攻撃から電力網をまだ保護していない米国にとって考えられる終末的なシナリオは次のとおりです。

寒い冬の夜の嵐の中、4 発の原子爆弾が大気圏外でアメリカの都市ダラス、ラスベガス、コロムバス、ユカタン湾上空で連続して爆発した。人々は空に大きな光を見ますが、爆発による騒音も吹き飛ばしも灼熱も感じません。しかし、それらは強力な電磁波を発生させ、機能しているすべての電子および電気システムを即座に破壊します。これは、私たちの現代生活に必要なものが、長い間存在しなくなることを意味します。通信および規制用の電子機器は機能しなくなります。照明、移動、加熱、冷却、硬化、液体の圧送や循環を行う電気装置は、電気ネットワークの物理的な破壊により機能しなくなります。その結果、エネルギー生産工場や工場は稼働を停止し、人や物資を輸送するためのガソリンも不足します。すべてが停止し、差し迫った大規模な暴動による混乱がただちに起こるでしょう！ これを実現するには、メキシコ湾の海中から弾道ミサイルを発射する潜水軍艦が 1 隻あれば十分です。数分の短い接近時間により、アメリカの対ミサイル防衛が爆発する前に破壊することは完全に阻止されます。

私たちの非常に複雑な文明の調和のとれたバランスと良好な機能には、必然的に平和、調和、協力が必要です。核兵器を使って戦争をする準備ができてるのは、狂った人々だけです。

2024.11.26 DR Kongo

Sincera amiko,

Saluton !

Estas kun zorgo sendi al vi ĉi tiun embarasan mesaĝon. Miaflanke, mi scias, ke la ekonomia krizo estas preskaŭ ĉie en ĉi tiu hodiaŭa mondo. Kelkfoje ĉi tiu ekonomia krizo estas kaŭzita de ĉi tiuj multoblaj militoj.

Certe, ni familio de nia fratino Melissa, kiu spertis la gravan vundon de perforto lastfoje de unu el la soldatoj de ĉi tiu movado de M23 kiu nuntempe kontrolas nian teritorion, ĉi tiu filino ankoraŭ ne povas akiri aŭ aĉeti ĉi tiun multekostan rulseĝon. La kuracistoj povis fari sian laboron por kuraci ŝin kaj hodiaŭ estas pozitiva plibonigo por ŝi.

Alia malfacilaĵo ĵus aperis. Eĉ se tiu fratino ĵus estis kuracita, ŝi ne povas piediri sed ŝi estas devigita serĉi ruliĝantan biciklon ofte nomitan "rulseĝo" en aliaj vortoj. Ĉi tiu ruliĝanta ilo estas tro multekosta je valoro de \$385, ni tro miris. Pri tio, ni kiel familio restas sen finance por solvi ĉi tiun situacion.

Dum ĉi tiu monato, ni multe elspezis pri nia avino N'BERA ASUNAT, kiu estis malsana dum 8 monatoj en hospitalo sed finfine ŝi mortis pasintsemajne, mi pensas, ke vi havis ĉi tiun informon. Kun tio, ni petegas vin, ĉu vi povas redoni ĉi tiun financan helpon al ni laŭ via kapableco.

Dankon pro akcepti nian plendon pri ĉi tiu dramo. Vi povas aŭ deponi la kontribuon al : Western Union aŭ MoneyGram aŭ MoneyTrans Goma/DR Congo.

Ĉiam uzu miajn nomojn: HONORÉ SEBUHORO NDARIHORANYE.

TIAJ. +243997852933.

Dankon!

2024. 11. 26 コンゴ民主共和国

こんにちは！ この恥ずかしいメッセージをお送りするのは嫌なのですが。

私としては、今日、世界のほどこでも経済危機に見舞われていることを知っています。この経済危機は、こうした複数の戦争によって引き起こされる場合があります。

確かに、私たち妹のメリッサの家族は、現在私たちの領土を支配している M23 運動の兵士の一人による前回の暴力で重傷を経験しましたが、この娘はまだこの高価な車椅子を手に入れることも購入することもできません。医師たちは彼女を治すために仕事をするのができ、現在では彼女に前向きな改善が見られています。

別の困難が発生しました。その妹は治療を受けたばかりなのに歩くことができないのに、「車椅子」を探さなければなりません。この自転車は 385 ドルと高価すぎて、私たちはあまりにも驚きました。これ



に関して、私たち家族は経済的にこの状況を解決することができません。

今月、私たちは祖母の N' BERA ASUNAT のために多額の費用を費やしました。N' BERA ASUNAT は病気で 8 か月間入院していましたが、ついに先週亡くなりました。この情報はご存知だったと思います。

つきましては、どうかあなたの能力に応じて、この経済的援助を私たちに返していただけますようお願い申し上げます。この件に関してお話を聞いていただきありがとうございます。次のいずれかに寄付を預けることができます。

ウェスタン ユニオン、マネーグラム、マネートランス ゴマ/コンゴ民主共和国。常に私の名前を使用してください：

HONORÉ SEBUHORO NDARIHORANYE.

TIAJ. +243997852933.

## Japanio HORI Jasuo 日本 堀泰雄

### Ĉu la japana politiko ŝanĝiĝos?

La balotado de la Ĉambro de Reprezentantoj okazis la 27-an de oktobro 2024, kaj la reganta koalicio de la Liberala Demokratia Partio (LDP) kaj Koomei (religia partio) ne ricevis plimulton de seĝoj.

#### Regantaj partioj

Liberala Demokratia Partio	256 → 191
Koomei	32 → 24
<hr/>	
Sume	288 → 215

#### Opoziciaj partioj kaj aliaj

Rikken (centrista)	98 → 148
Iŝin (dekstra)	43 → 38
Kokumin (centrista)	7 → 28
Komunista Partio	10 → 8
Reiŭa (maldekstrema)	3 → 9
<hr/>	
Aliaj	16 → 19
Sume	177 → 250

\* Inter la « Aliaj » estas eksaj LDP-anoj, kiuj volas esti akceptitaj kiel LDP-anoj kaj LDP tion aprobis, do la nombro de LDP-anoj multiĝis je 5.

#### La nova ĉefministro estis elektita

La eksa ĉefministro Kiŝida jene deklaris sian eksiĝon la 14-an de aŭgusto.

« Ni devas firme pruvi al la popolo, ke LDP ŝanĝiĝos. La plej evidenta unua paŝo por montri ŝanĝon estas, ke mi retiriĝu. Mi ne kandidatiĝos en la venonta prezidant-elekto de LDP. »

Kiŝida insistis, ke li fais reformon de la partio, kiel ekzemple dissolvo de frakcioj kaj puno de rilataj membroj, kiuj kaŝis kontraŭleĝan profiton, tamen publika kritiko al li intensiĝis kaj kabinetaj aprob-taksoj tiel malkreskis, ke li devis eksiĝi.

Sekvante lian eksiĝon, okazis la elekto de la pezidanto de LDP, kaj elektiĝis Iŝiba Ŝigeru. Jam de 10 jaroj li estis kritikema al la kabinetoj de kelkaj ĉefministroj. Eĉ dum la prezidanta elekto li diradis same, ekzemple « Kiam mi estos elektita, mi unue okazigos la parlamentan diskuton por montri al la popolo, kio estas la politiko de mia

kabineto », sed kiam li estis vere elektita, li tuj rompis tiun promeson kaj okazigis la balotadon de la Ĉambro de Reprezentantoj plej rapide en nia historio, por ne doni tempon al la opoziciaj partioj kunlabori por kandidatoj. Multaj popolanoj, kiuj esperis al Iŝiba, tuj seniluziĝis.

Krome dum la elekta periodo LDP donacis 20 milionojn da enoj (120 mil eŭrojn) el la buĝeto liverita de la ŝtato eĉ al siaj filioj, kiuj havis punitajn kandidatojn. Tio signifis, ke LDP tute ne havas peksenton pri korupta mono, kaj popolanoj multe koleris pro tio. Tiu mondonacado donis grandan baton al LDP, kaj pli perdis al ĝi siajn seĝojn.



### **Iŝiba Ŝigeru** (67-jara)

Naskiĝis en februaro 1957 en la gubernio Tottori kiel filo de eksa guberniestro. Ekde 1986 li estas parlamentano.

Li estas konata pro sia scio pri sekurecpolitiko, kaj ankaŭ estas konata kiel amanto de armiloj, ĉar lia ŝatokupo estas fari plastajn modelojn de ĉasaviadiloj kaj batalŝipoj. Li estas fervojoamanto, libroamanto kaj kuiradoamanto. (laŭ interreto)

Dum la elekto li promesis 5 protektojn: “Protekti la estontecon de Japanio” kaj surbaze de tio, “Protekti Regulojn, Japanion, Homojn, Lokajn regionojn kaj Oportunojn por virinoj kaj gejunuloj.”

**Mia komento:** Li parolas malrapidege kiel stultulo, ŝajne intencante klarigi klare, sed la enhavo estas nebula kaj ne komprenebla. Mi aŭdas, ke li multe legas librojn, sed ŝajnas al mi, ke li nur legas literojn, sed ne komprenas la enhavon. Kiel 67-jarulo li devas havi kleran kaj homecan mienon, sed tute ne. Lia buŝo estas kvazaŭ tiu de puffiŝo. Mi hontas, ke li aperos en la mondo kiel la reprezentanto de Japanio.

## **Komunista Partio malkaŝis la korupdadon kaj mondonacon de 20 milionoj da enoj de LDP**

La frakcioj de la LDP kaŝis parton de la profitoj el la politikaj « kvestbankedoj », ne registrante ĝin en siaj politikaj fondusenspezaj raportoj. Aparte, ĉe politikaj kvestbankedoj sponsoritaj fare de la Abe- kaj Nikai-frakcioj, biletvendkvotoj estis truditaj al la membroj, kaj ĉiuj profitoj, kiuj superis la kvotojn, estis resenditaj al la membroj, kaj ili faris dubindajn elspezojn per la repagita financo.

Ĉi tion malkaŝis Japana Komunista Partio en sia organo *Akahata* (Ruĝa standardo) en novembro 2022, kaj ĝin sekvis aliaj amaskomunikiloj, igante la aferon granda skandalo de LDP. Tio perdis al la popolanoj kredon al la Kiŝida-kabineto, kaj fine Kiŝida devis eksiĝi.

\*Por scii pli detale pri tiuj aferoj, vi legu la ĉapitron « Monskandala reganta partio »

en « Raportoj el Japanio 27 », ekde la paĝo 33.

Kaj dum la elekto-periodo Komunista Partio denove malkaŝis la mondonacon de 20 milionoj da enoj de LDP al la filioj de la partio. Tio donis la finan baton al LDP kaj ĝi perdis multege da seĝoj en la parlamento.

Tamen ironie, Komunista Partio, la plej granda kontribuinto por politika ŝanĝiĝo, perdis siajn seĝojn. Ĝis nun kutime okazis kunlaboro inter Komunista Partio kaj Rikken, ekzemple ambaŭ subtenis unu komunan kandidaton en elektodistrikto, sed ĉi-foje mankis al ili tempo por aranĝi la kunlaboron, sekve ĉiuj partioj ne nur la tiuj du devis kandidatigi siajn proprajn kandidatojn en elektodistriktoj. Tial balotantoj, kiuj kontraŭis la koalicion de LDP kaj Koomei, elektis kandidatojn verŝajne elektiĝontajn, kaj rezulte multaj voĉdonoj iris al kandidatoj de Rikken, kaj ne al malpli elektiĝontaj kandidatoj de Komunista Partio. Malvenko de Komunista Partio estas malĝojiga afero por mi, sed mi akceptis la balotrezulton kun feliĉa sento, ĉar mia malamata LDP malvenkegis.

### **Bona rezulto por la Japana Konstitucio**

Mi havas alian feliĉon pri la rezulto de la elekto. Tio rilatas al la Japana Konstitucio.

LDP, Koomei, Kokumin kaj Iŝin intencas ŝanĝi nian konstitucion, kiun ni pacamantoj nomas Paca Konstitucio, ĉar ĝi malpermeas militrajton de la ŝtato. Precipe LDP forte insistas aldoni la vorton “Japana Defendkorpuso” al la konstitucio, por ke Japanio povu batali eksterlande kune kun la usona armeo. La pacamantoj forte kontraŭas tion, pledante, ke tio igos Japanion militema lando same kiel antaŭ la dua mondmilito.

Por ŝanĝi la konstitucion, pli ol du-trionoj de la parlamentanoj devas subteni, kaj antaŭ tiu ĉi balotado parlamentanoj el LDP kaj aliaj 3 okupis sufiĉajn seĝojn por tio, do ni tre timis, sed feliĉe, rezulte de tiu ĉi balotado tiuj dekstraj parlamentanoj multe malaperis kaj ili ne plu okupis sufiĉajn seĝojn. LDP perdis multajn seĝojn, kaj en la konfuzo ĝi jam ne havas sufiĉan energion por la konstitucio, do dum iom da tempo nia konstitucio restos kiel “Paca konstitucio”. Tio estas bona afero ankaŭ por la najbaraj landoj, kiuj tre timas reviviĝon de militema Japanio.

(la 3an de novembro 2024)

新政権誕生について書きました。

共産党が、今回の選挙結果の招来に大きな貢献をしたにも拘わらず議席を減らしたこと。

とりあえず、憲法改正に必要な 3 分の 2 の議席を自民、公明が失ったことで、憲法改正は当面はないだろうということが書いてあります。